4(177)
2020

# Apudvistula Bulteno

de Krakova Societo ESPERANTO

Bultenon redaktas: Ĉiuj anoj de Krakova Societo ESPERANTO,
Adreso por korespondi: str. Sokolska 13, 31-515 KRAKÓW

Julia Hartwig

## Nagana

Jaka jesteś niedołężna pamięci
wszystko gubisz zdarzenia słowa obrazy
to co najcenniejsze
O pamięci bez opamiętania dążąca
do pustki
spustoszona
niewierna pamięci która coraz głębiej
zatapiasz stały ląd przeszłości
niszcząc sama siebie
O samowolna która tylko to co chcesz
rzucasz na ekran
nie bacząc na nasze oczekiwania
O podstępna która lubisz posługiwać się snem
z którym łączą cię fałszywe układy
i bezwolnie mylisz twarze i gesty
czyniąc najbliższych obcymi
a obcym przyznając niezasłużoną bliskość
Pamięci która pracujesz dla nas
choć nam nie podlegasz
i szydzisz z nas patrząc na blaknące fotografie
na osierocone kobiety
które znów włożyły kolorowe suknie

1998

Z tomu „Zobaczone”,
Wyd. A5, Kraków 2000

trad. Lidia Ligęza

## Riproĉo

Kia vi vi estas kaduka memoro
ĉion vi perdas eventojn vortojn bildojn
tion kio la plej valora
Ho memoro senresobriĝe strebanta
al malpleno
detruita
malfidela memoro kiu pli kaj pli profunde
dronigas firman teron de la pasinto
detruante sin mem
Ho arbitra kiu nur tion kion vi volas
ekranigas
ne klopodante pri niaj atendoj
Ho trompa kiu ŝatas utiligi sonĝon
kun kiu ligas vin falsaj paktoj
kaj senvole erarigas vizaĝojn kaj gestojn
farante la proksimulojn fremduloj
kaj al fremduloj koncedas nemeritan proksimon
Memoro kiu laboras por ni
kvankam de ni ne dependas
kaj mokas de ni rigardante paletajn fotojn
orfiĝintajn virinojn
kiuj denove surmetis kolorajn robojn

1998

El la volumo „Ĝi ekvidita”
Eld. A5, Krakovo 2000

Krakova Societo ESPERANTO kun tristo informas,
ke la 28-an de oktobro 2020 j. mortis post la grava malsano
travivinte 79 jarojn nia kara amiko
s.†m.

**Bronisław Kieres**

Doktoro de Juraj Sciencoj de Jagelona Universitato,
Juĝisto de Distrikta Juĝejo en Krakovo,
ano de Krakova Societo ESPERANTO.
La funebra diservo kaj la entombigo okazis en Krakovo,
sur Batowice-Tombejo,7.11. 2020 j., je la 13:00 h.

Aro de Geamikoj kaj Samideanoj



BRONISŁAW **KIERES** naskiĝis en Kielce 20. 02. 1941 j. Edukadon li komencis en privata lernejo de monaĥinoj el Nazaret en Kielce. En la jaro 1952 la familio translokiĝis al Nowy Sącz, kie li finis elementan lernejon kaj poste II Liceon al Maria Konopnicka en la jaro 1959. Kun Józef Lipiec (posta universitata profe-soro pri filozofio) li redaktis la lernejan gazeton kaj skribis romanon. La jurajn sciencojn li finis en Jagelona Universitato en la jaro 1964.

Samtempe kun komenco de la studado formiĝis en Jagelona Universitato kvarpersona lingvo-kurso de internacia lingvo Esperanto, kiun gvidis prof. Mieczysław Sygnarski. Bronisław Kieres fervore en ĝi aktivis kaj ankaŭ konvinkadis la familion, ke estas bone koni Esperanton. Efike li sukcesis konvinki la fratinon Jolanta (la nunan instruistinon de Esperanto), kaj multe pli poste la filinon kaj la nepinon.

Post studoj li komencis labori en Zakopane kiel juĝisto. Reveninte al Krakovo li eklaboris kiel asistanto en Jura Fakultato de Jagelona Universitato.

En la jaro 1970 li edziĝis al Krystyna, ankaŭ juristino, kun kiu li havis 3 gefilojn. Dum preskaŭ tuta plenaĝa vivo li loĝis en Krakovo; ĵus antaŭ 3 jaroj li translokiĝis al Gliwice kun la dua edzino Elżbieta.

Jam en mezlernejo kaj dum studoj Bronisław multe vagadis tra polaj montuj, estante la gvidanto de studentaj grupoj. Li estis posedanto de Granda Ora Insigno de PTTK. Li multe vojaĝis tra eŭropaj kaj ekstereŭropaj landoj ĉiam estante tre bone pretigita por ĉiu ekskurso kaj multe sciis pri ĉiu lando, kiun vizitis. Liaj vojaĝoj estis ofte ligitaj kun multaj Universalaj E-Kongresoj, ofte prezentante prelegojn dum kunvenoj de juristoj. Poste li raportis pri tiuj aranĝoj dum klubaj kunvenoj de KSE parole kaj filme.

Konstante li interesiĝis pri politikaj aferoj. En la j. 1964 li fariĝis ano de Demokratia Frakcio, kie dum la jaroj 1960 - 70 estis funkciulo de Vojevodia Komitato de DF. Li laboris tie ankaŭ kiel konsilanto pri juro kaj pri turismo kaj vicprezidanto de Komisiono pri Protekto de Medio. dum la jaroj 1980-aj li estis vicprezidanto de Centra Partia Tribunalo DF.

Inter liaj multaj interesiĝoj troviĝis literaturo, ĉefe ĉiuj verkoj de Stanisław Lem. Inter jaroj 1960 - 70 – grandiozaj por la krakova teatro li preterpasis nek unu spektaklon precipe ŝatante eŭropajn novaĵojn. La mondo de muziko ĉiam estis por li esenca, fidele kaj multfoje li ĝuis koncertojn en Krakova Filharmonio.

Anoj de Krakova Societo ESPERANTO

# Sukcesa evento en Krakovo dum pandemio

En la tagoj 11a-13a de septembro 2020 okazis la 32-aj Esperantaj Tagoj de Krakovo en la renovigita Kulturcentro de Podgórze. La evento estis kelkfoje replanita pro la tutmonda san-situacio, sed kiam ĝi pliboniĝis ĉi-somere la estraro de la Kulturcentro ebligis kaj helpis organizi ĝin. Bonŝance la sunplena vetero akompanis nin. Sume la eventon partoprenis 35 samideanoj, kiuj – laŭ postuloj de la organizantoj – subiĝis al la rekomendoj de Ĝenerala Sanitara Inspektisto kaj ĉiuj revenis hejmen sanaj.

Okazis diversaj prelegoj, plejparte ilustritaj de lumbildoj. En lingva parto de la programo elpaŝis Magdalena Tatara: „Lernoeblecoj de la franca lingvo per Interreto", Grzegorz Słowiński: „La kaŝa komerca ĵargono de mia urbeto" kaj Edward Kozyra: „Prezentado de noveldonita vortaro EO-PL-EN". Arton kaj literaturon prezentis Anna Ramza: „Doktoro Esperanto", Lidia Ligęza: „La popolaj inspiroj en verko de Stanislao Wyspianski", Adam Wilkus: „Rakonto de rabino Nachman", Roman Dobrzyński: „Halka kantas Esperante", Jerzy Antoni Walaszek: „Sekreto de bona biblio-teko". Pri interesaj foraj kaj proksimaj vojaĝoj rakontis Dariusz Caban: „En la urbo Ljubljana post jaroj", Robert Kamiński: „Vojaĝo al Jerusalemo, al la dezerto Negevo kaj la Morta Maro" kaj en la alia prelego: „Impresoj el Munkeno kaj Regensburgo", Adam Wilkus: „La Krono de Polaj Montoj", Bożena kaj Marian Kocyk: „La Karaiba Aventuro".

Ewa Caban prezentis prelegon: „Baza demandaro pri Vikipedio", Magdalena Tatara parolis pri: „Kulturheradaĵo de UNESCO en Krakovo kaj en regiono Małopolska", Adam Wilkus prezentis ŝercojn pri la vivo: „Drole kaj petole pri vivo, kiu ne traktas nin mole".

Dum ambaŭ vesperoj ni ĝuis belajn koncertojn de E-kantoj kiujn kun akompano de gitaro plenumis Wojtek Ławnikowicz kaj Zuzanna Kornicka.

Sanktan meson celebris sabate esperanta animzorganto, pastro Roman Gmyrek en kapelo de preĝejo al Sankta Jozefo en Podgórze.

Okaze de la evento oni povis rigardi la fotoekspozicion: „Naturo per okuloj de esperan-tistoj", al kiu siajn verkojn alsendis 10 samideanoj el Pollando kaj Slovakio. Partoprenantoj voĉ-donis al tri plej belaj fotoj de faŭno kaj flaŭro. Surbaze de la nombro de ricevitaj voĉoj oni elektis laŭreatojn de la fotokonkurso. La unuan premion ricevis Vladimír Škuta (SK), la duan Andrzej Sochacki (PL) kaj la trian Adam Wilkus. En la fotoekspozicio oni prezentis ankaŭ verkojn de: Ewa Caban, Maria Škutova, Maria Wrożyna, Agnieszka Baczkura, Józef Duma, Paweł Dzienis kaj Peter Rybín.

Sabate la partoprenantoj promenis al la najbaraj parkoj kaj historiaj lokoj de la iama urbo Podgórze kaj supreniris al la proksima monteto Krzemionki Podgórskie kovrita de verdaĵo, apud iama ŝtonminejo, el kies pinto estas bela pejzaĝo.

Multaj samideanoj partoprenis la dimanĉan ekskurson al la plej malgranda en Pollando, ta-men vizitinda pro multaj allogaĵoj Nacia Parko de Ojców, fama pro eksterordinaraj rokoj en verdaj valoj, kavernoj, kie vivis jam la neandertala homo, riveretoj, fiŝkultivadejo de bruna truto kaj reno-vigitaj kasteloj.

Oni povas rigardi fotojn pri la evento ĉe: https://tiny.pl/7pmgs.

laŭ aldonaj informoj de Adam Wilkus kaj Robert Kamiński raportis
*Jadwiga Dzięgielewska*

Magdalena Tatara

# Krakovo kaj Unesko

En 1972 Unesko (La Eduka, Scienca kaj Kultura Organizo de Unuiĝintaj Nacioj) decidis krei la ”Liston de Monda Kultura kaj Natura Heredaĵo”. Ĝia celo estas protektado de la plej valoraj lokoj kaj regionoj de la mondo, gravaj laŭ la historia, kultura kaj natura vidpunktoj.

En septembro 1978, en Vaŝingtono dum la kunveno de la Unesko-Komitato estis anoncita la unua Listo de la Monda Kultura kaj Natura Heredaĵo. Sur la listo aperis nur 12 lokoj, inter kiuj estis du el Pollando: Krakovo kaj la salminejo en Wieliczka.

La mezepoka centro de Krakovo kun reĝa kastelo Wawel kaj du historiaj kvartaloj Stradom kaj Kazimierz estis unusola urba komplekso en Eŭropo troviĝanta sur la unua Unesko-Listo. Dua listigita urbo krom Krakovo estis la urbo Quito el Ekvadoro.

La decido de Unesko estis pravigita jene: “La historia kaj arkitektura centro de Krakovo, kiu estis formita dum preskaŭ mil jaroj, estas unu el la plej rimarkindaj artaj kaj kulturaj kompleksoj en Eŭropo. (...) Krakovo transdonas al la posteuloj ĉi tiun unikan kolekton de la kultur-monumentoj el la pasintaj jarcentoj - elstarajn artajn kaj arkitekturajn verkojn".

Krakovo estis fondita en 1257 kaj ĝis nun gardas sian mezepokan urban strukturon kaj ĝia ĉefplaco en Mezepoko estis la plej granda en Eŭropo. En la krakovaj kvartaloj Malnova Urbo kaj Stradom troviĝas pli ol 330 historiaj, imponaj loĝdomoj kaj preskaŭ 30 preĝejoj el diversaj epokoj. La parto de Krakovo, kiu estas protektata de UNESCO inkluzivas ankaŭ la plej malnovan en Pollando Jagelonan Universitaton, kiun fondis la reĝo Kazimiro la Granda en 1364 kaj la monteton Wawel kun reĝa kastelo kaj katedralo. Ege interesa kaj vizitinda estas ankaŭ listigita la juda kvartalo Kazimierz kun historiaj sinagogoj kaj juda tombejo.

Krakovo, iama reĝa urbo kaj ĉefurbo de Pollando, hodiaŭ estas konsiderata kiel kultura ĉefurbo de nia lando kaj unu el la plej belaj kaj vizitindaj polaj urboj.

Nuntempe sur la listo de UNESKO oni enskribis pli ol 1100 lokojn el la tuta mondo kaj inter ili 30 en Pollando.

# La gastama provinco

Migranta komercisto estis vojaĝanta en provinco. Ĉirkaŭvaginte la tutan tagon li venis iun vesperon laca kaj dormema al malgranda bieno, kie estis loĝanta geedzparo kun siaj ses infanoj.

Petinte la permeson tranokti tie li tuj ricevis ĝin. Vespermanĝante la komercisto rimarkis, ke la patrino metas la infanojn po du en la liton. Kiam la unua paro estis ekdorminta, oni transportis ilin sur la plankon kaj la nova paro ricevis lokon en la lito. Ekdorminte ili siavice devis cedi ĝin al la lasta paro. Kiam ĉiuj infanoj estis jam tiamaniere ekdormintaj, la mastro diris al la fremdulo.

- Bonvolu, nun la lito estas je via dispono.

La komercisto kuŝiĝis kaj tuj ekdormis. Matene vekiĝinte li trovis sin kuŝanta sur la planko apud la infanoj, kaj en la lito estis trankvile ronkantaj la ambaŭ gemastroj.

*laŭ „Svenska Dagbladet”*